



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

JUNA AMIKO

Jus aperis
numero 2 de
la dua jar-
kolekto!

Mendu tuj!

Eldonanto/Herausgeber

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 6/1975 - 10 feb 1975
Aperas ĉiusemajne

Partia gremio diskutas pri planlingvo

* 17 - 24 februaro 1975 *
* Semajno de Internacia *
* Amikeco (SIA) *

Düsseldorf (pp) La Laborrondo "Duagrada ŝtupo I" (Sekundarstufe I) de F.D.P. (Liberaldemokrata Partio), faka komisiono pri lerneja politiko, sub prezido de s-ino H. Schmiedel, Dortmund, kaj prof. d-ro Helmar Frank, Paderborn, decidis la 13.1.75 konekse kun la de la liberaluloj proponitaj enirkondiĉoj en la duagradan ŝtupon I interalie: "Estu esplorite per unuagradaj lernejoj eksperimentoj, kiomgrade (cetere kiel libervola fako proponenda) instruado de interlingvistika planlingvo kiel didaktika modelo de fremda lingvo profundigas la rigardon en la gepatran lingvon, malpliigas la danĝeron de legastenio, plifaciligas la ellernon de la unua fremdlingvo en la duagrada ŝtupo I kaj taŭgas kiel pli posta helpo en la decido pri la elekto de ĉi tiu lingvo (inter speciale la angla, franca kaj latina)."

Rigarde al la instruenhavoj de la duagrada ŝtupo I (5a - 10a lernojaro) plue estis postulite: "La esenca kampo provizore ampleksas 5 partojn, al kiuj post la alcelita interkonsento pri komuna eŭropa dua lingvo de la Eŭropa Komunumo (eventuale neŭtrale interlingvistika planlingvo kiel sintezo de la eŭropaj naciaj lingvoj) ĉi tiu interkonsentita lingvo aldoniĝos kiel sesa parto."

Broŝuro de scienca instituto en Esperanto

Paderborn (pp) Baldaŭ aperos broŝuro kun raporto de la laboro ekde 1971 kaj la estontaj projektoj de la "Instituto por Kibernetika Pedagogiko en la Esplor- kaj evolucentro por objektivigitaj instru- kaj lern-procedoj" (Institut für Kybernetische Pädagogik im Forschungs- und Entwicklungszentrum für objektivierte Lehr- und Lernverfahren), Paderborn, kies direktoro estas prof. d-ro Helmar Frank. La uzitaj lingvoj estas la germana kaj Esperanto. Ke oni ankaŭ uzis Esperanton, tio ne signifas, ke oni "volas atingi tutmonde pli grandan priatecon per nura okulfrapeco de la raporto, sed dezirindaĵo de kibernetika instituto atentanta pri la postuloj de nenombra donitaĵ-prilaborado." La broŝuro entenas kontribuaĵojn de 12 institutaj kunlaborantoj kaj la Esperanto-tradukon prizorgis sep spertaj esperantistoj. Ĝi ampleksas 70 paĝojn en formato DIN A 5. La sola distribuanto por esperantistoj estas Libroservo Ludwig Pickel, Nürnberg, kie oni povas jam nun antaŭmendi la interesan kaj gravan eldonaĵon, kiu certe havos ankaŭ informan kaj varban efikon. La prezo estos fiksoto, sed estos modesta.

Enketo pri la Esperanto-gazetaro

Budapeŝto (pp) La redakcio de Hungara Vivo, kiu jam eldonis kelkajn tematikajn numerojn, volas eldoni sian numeron trian 1975 kiel "numeron pri la problemoj de la gazetaro de Esperantujo" kaj turnis sin al kelkaj redaktoroj de E-revuoj por respondi jenajn demandojn:

- 1) Kiajn problemojn havas via gazeto? (Financaj, presaj, redaktaj, disvastigaj ktp.)
- 2) Kiom da ekzempleroj kaj aparte abonantoj havas via gazeto?
- 3) Kio estas via opinio pri la hodiaŭa gazetaro de Esperantujo?
- 4) Viaj proponoj por plibonigi la ĝeneralan kondiĉon de nia gazetaro?

Pola Esperanto-Movado en 1974 (Dua parto kaj fino)

Laŭ Esperanto-elsendo de Pola Radio

Varsovio. El inter la aliaj eldonaĵoj aperintaj en la jaro 1974 elstaras la libro "Pollando - nombroj kaj faktoj", kiu en konciza formo prezentas la diversajn aspektojn de la vivo de nia lando. Substrekindas aparta ĉapitro pri la pola Esperanto-movado. Tutcerte ĝi bone servos al la informado pri nia lando en la eksterlandaj esperantistaj medioj. Ke ĉi tiel vere estas montras la unuaj skribaj reagoj je la eldonaĵo venintaj al nia E-redakcio. La mendojn pri ĉi tiu senpage distribuata libro ni plue akceptas.

Se ni jam mencias la informadon, ni haltu por momento ĉe ĉi tiu agadsfero. En la informado al eksterlando PEA plue uzis la revuon "Pola Esperantisto", kiu - kvankam aperas ne tute regule - sed tamen bone servas al la informado en eksterlandaj esperantistaj medioj pri polaj temoj kaj nia movado. Al tia informado kontribuas ankaŭ la esperantlingvaj eldonaĵoj de la Polaj Aer-Linioj "LOT". En 1974 aperis ekzemple "Rakontoj de kapitanoj", kiu eldonaĵo estis distribuata dum la Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo.

En la sfero de la enlanda informado al la neesperantista publiko, menciindas la konstantaj inform-bultenoj de PEA, la konstantaj E-rubrikoj en kelkaj ĵurnaloj, la vasta utiligado de inform-brosuretoj, prelegoj k.a. Ekzemple la broŝureto "ABC języka esperanto" (A-Bo-Co de la lingvo Esperanto) estis reeldonita tri fojojn en la kvanto de 12.000 ekzempleroj. Ĉi tiu vigla informa laboro kaŭzis, ke ĝis la fino de novembro 1974 al la Ĉefa Estraro de PEA venis 12.491 demandoj pri la korespondaj kursoj, aĉeteblo de lernolibroj kaj vortaroj, membrigado al PEA k.s. En la gazetaro en la sama periodo aperis 3.334 informoj, artikoloj aŭ intervjuoj pri Esperanto; oni prezentis unu televidan intervjuon en la tutlanda programo.

Al la pli vasta informado pri Esperanto servis ankaŭ la multaj aranĝoj kiuj ĉi-jare, en 1974, okazis en nia lando. Ni menciuj pri la IVA Internacia Feriado en Miedzydroje, la Xa Feriado en Miedzygórze, Konferenco de "Monda Turismo" en Inowroclaw, tutlanda turista renkontiĝo en Szczecin okaze de la Internacia Tago de la Turismo.

Al ĉi tiu kresko de la interesiĝo pri Esperanto kontribuis ankaŭ pluraj kulturaj aranĝoj, inter kiuj la teatraj prezentadoj de la teatro je la nomo de Antoni Grabowski - "Pola Esperanto-Teatro", kiu en diversaj urboj montris la teatraĵon "Proksima Nekonato" de Alexander Scibor-Rylski. Geaktoroj - Kalina Pieńkiewicz kaj Zbigniew Dobrzyński - prezentis ĉi tiun teatraĵon tre sukcese ankaŭ dum la Universala Kongreso en Hamburgo kaj dum la TEJO-kongreso en Münster en FRG kaj dum la Kultur-Festivalo en Opava en Ĉeĥoslovakio. Ali-flanke Andrzej Tomecki prezentis la spektaklon "Kaj tamen estas Varsovio" dum la tutlanda konferenco de la esperantistoj de GDR en Berlino.

La pasinta jaro estis por polaj esperantistoj abunda je internaciaj kontaktoj. Tutspeciale substrekindas la duflankaj kontaktoj inter la polaj esperantistoj kaj tiuj en GDR. Vigla kunlaboro disvolviĝis kun la esperantistoj en Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Bulgario - tutspeciale en la turisma kampo. Polaj vojaĝoficejoj "Juventur" kaj "Gromada" ĉiam pli ofte uzis por sia faka laboro la internacian lingvon kaj "Juventur" aŭtune organizis eĉ internacian turisman konferencon en Bydgoszcz, kiu kredeble evoluigos la aplikadon de Esperanto por turismo.

Resume oni povas konstati, ke la pasinta jaro karakteriziĝis per la kreskanta agad-vigleco de la lokaj Esperanto-grupoj, kiuj montris

(daŭrigo sur p. 3)

Ĉiam pli da iniciatemo kaj emo labori per kaj por Esperanto. Ĉi-loke valoras substreki, ke nia plej granda vojevodia filio en Bydgoszcz atingis 1.000 membrojn. Sendube ĝi estis en nia lando jaro valora kaj riĉa je eventoj, jaro de ĉiam pli trafa kaj ĉiam pli vasta utiligado de Esperanto por fakaj celoj. A. Pettyn

Zamenhof-festo en januaro

Ĝenevo(pp) Jaron post jaro la datreveno de la 15.12. fariĝas mejlo-ŝtono en la vivo esperantista. Ĉirkaŭ la honorata figuro de la kreinto de Esperanto plej diversaj tendencoj povas libere ekzisti kaj eĉ fortigi sin reciproke. Rigardo malantaŭen al la apero de Esperanto kaj al ĝia sana enplantiĝo en la mondon preparas nin al klarvida agado nuntempa kaj estonta.

Danĝero tamen montriĝis: en decembro, monato de l' ĉiulandaj jar-transiraj festoj la Zamenhofa celebros riskas perdiĝi inter la ĝeneralajn atento-kaptantajn manifestaciojn.

Tute prave la ĝeneva Esperanto-grupo "La Stelo" decidis do prokrasti je kvar semajnoj la Zamenhofan Feston. El la efektiviĝo de tiu ideo aperis bonegaj rezultoj. Vasta kaj elasta programo etendiĝis tagmeze ĝis la 19a horo. Okazis interalie: Festa prelego de Andres Bickel: "115 jarojn Zamenhof kaj poste?". Du komedietoj (unu de F. Karintha, alia de R. Schwartz). Solo-kantoj de Joĉjo Tomaszczyk, juna polo oficanta en Ĝenevo. Komunaj kantoj, vere majstre direktataj kaj akompanataj de la grup-prezidantino, s-ino Mad Mevo-Stakian.

Celebri la feston de Esperanto en januaro havas ankoraŭ unu avantaĝon: tiamaniere ni kunigas la 15an de decembro kun la 18a de januaro. Efektive, la 18an de januaro 1908 Zamenhof, nome de la tuta tiam esperantistaro, rompis definitive ĉian rilaton kun la reformista tendaro de Ostwald, Couturat, Beaufront kaj kompanio! Tio estis necesa kirurgia operacio, sen kiu Esperanto nun verŝajne plu ne ekzistus. Tiu dat-reveno de la liberiĝo meritas esti celebrata kun egala firmeco kiel la naskiĝo de Zamenhof kaj la publikiĝo de Esperanto.

Wm-A. Perrenoud-Theis, Dr.sc.
CH-2205 Montmollin

Dufoje Esperanto-kunvenoj en Bavario

Munkeno. (pp) Esperanto-grupo Munkeno kunlabore kun la distrikto-komisiito por Esperanto de la germana fervojo, distrikto Munkeno, Josef Weidacher, organizis informkunvenon, lunde, la 20 jan 1975, je la 18a horo, en stacidoma ekspoziciejo. Ĉeestis trideko da personoj, inter ili ĉ. 14 interesuloj. Oni montris la GEFA-ekspozicion kunmetita de Kurt Jentsch, kaj Libroservo Pickel prezentis malgrandan libroekspozicion. Ludwig Thalmeier, Landshut, montris per lumbildoj la praktikajn uzeblecojn de Esperanto.

Nürnberg. (pp) Esperanto-centro Nürnberg invitis la E-amikojn de Nürnberg - Fürth al dimanĉ-posttagmeza kunveno en Fürth, la 2an de februaro. Michael Zeilinger, Fürth, rakontis pri sia vojaĝo tra Japanio, kiun li faris kune kun sia familio. La montritaj lumbildoj ne prezentis la kutiman kliŝon de Japanio, sed donis perspektivon vidata de interne. - Günther Jacob, Nürnberg, montris mallongan filmon mem faritan pri la ĝemeliĝaj solenaĵoj en Forchheim inter la urboj Forchheim kaj la franca urbo Le Perreux, kaj Alexander Starke, Nürnberg, donis kelkajn ekzemplojn de sia deklama arto. - La kunvenon ĉeestis gastoj el Kronach.

Komik-strip-rakontoj en Esperanto!

Se vi volas ekscii la aventurojn de tri loĝantoj de la planedo Racio, aĉetu **JUNAN AMIKON**, duan jarkolekton! Ĝam aperis n-roj 1 + 2. Prezo por tri numeroj 3,- GM. Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, 85 Nürnberg 1 Postfach 2113.



Esperanto en la radio

Vieno. Pro organizaĵaj kaŭzoj la elsendoj de la 1/2 feb 75 ne okazis. Pro tio la intervjuo kun f-ino Jolanta Kieres el Pollando (vd. PP, n-ro 4/1975 p. 3) estis elsendita nur la 8/9 feb. Bedaŭrinde la aŭskultebleco en Nürnberg estis tre malbona, fakte eblis aŭdi nur fragmentetojn de la intervjuo kaj ankaŭ de la semajna komentario de d-ro Alfred Macher. Pli fortaj stacioj bedaŭrinde ĉiam ĝenas la Vienajn Esperanto-elsendojn. El la intervjuo kun f-ino Jolantha Kieres ni publikigas du pliajn citaĵojn.

F-ino Jolanta Kieres opiniis pri:

la viena kafo: "la mondfama viena kafo, kvankam ĝi ja estas bona, tamen ne atingas la aromon de la kafo, kiun servis al mi la Venecianoj."

pri la aŭstrianoj ĝenerale kaj la aŭstriaĵ esperantistoj speciale:

"Ĝenerale la aŭstrianoj estas - kvankam ĝentilaj kaj helpemaj - tamen ne tiom gastamaj kiel la sudaj kaj orientaj popoloj. Kiom da gastamo mi spertis, ekzemple ĉe la bulgaroj, okaze de la Universala Esperanto-Kongreso en Sofio! La koroj de la aŭstrianoj, kiel tiuj de la okcidentaj nacioj entute, ne estas tiom malfermitaj. Ĉi-tie oni preferas sian propran vivon, gastoj el eksterlando interesas plimalpli nur supraĵe. - Sed la aŭstraj esperantistoj, estas, kiel ĉie en la mondo, aparta hom-speco. Unuavice al la fratinoj Stamm, Hildgunde kaj Siglinde, mi dankas pro pluraj pruvoj de sincera amikeco."

Berno. Ges-roj Gacond daŭrigis siajn rakontojn pri NOBEL-pacpremiitoj, ĉi-tiuj pri Henri Dunant, la iniciatinto de la Ruĝa Kruco. - D-ro A. Baur memorigis pri la rilatoj inter Svislando kaj Germanio dum la dua mondmilito. Kvankam regis komercaj rilatoj inter ambaŭ ŝtatoj, tamen la svisoj rigardis la germanojn kiel "siajn malamikojn", kiuj eventuale atakus la neŭtralan landon. La svisa armeo ĉiukaze estis preta sin defendi...

Varsovio. Ĉu vi scias, kio estas "Monda Karuselo"? Se vi aŭdis la dimanĉan E-Ekspreson, vi scias: ĝi estas nova E-revuo, Esperanto-magazino. Espereble la multaj bonaj vortoj dediĉitaj de Jerzy Grum helpos, ke la revuo transvivos la venontan karnavalon. Pliaj E-Ekspresaj kontribuantoj: Apezaĵaj vortoj por la ĵurnalista laboro de Danuta Jakubiec de Dziennik Polski, Krakovo; intervjuo kun d-ro Werner Bormann, kaj post longa tempo denove "Novaĵoj de Pilo-Press."

La "Panoramo de internacia evento" de Leonid Abolnik tuŝis ĉiujn gravajn mondajn problemojn: La konferenco de parlamentanoj en Beogrado, la konferenco pri kunlaboro kaj sekureco en Ĝenevo, kie oni laŭdire trovis interkonsenton pri la problemoj de la "3a korbo", la Vienaj diskutoj pri la redukto de armeaj fortoj ktp. Ne mankis la problemoj numero 1, la proksima oriento. Ĉu vere nova konferenco en Ĝenevo, postulita de Sovetunio, povos solvi ĝin?